V- 16730/16 (1931/32)

MEI 1931 No. 1 16e Jaargang

NEDERLANDA KATOLIKO

Maandblad, officieel Orgaan van den Nederlandschen R.K. Esperantistenbond „Nederlanda Katoliko", gevestigd te 's-Hertogenbosch.

Opgericht 29 Augustus 1909. Bisschoppelijk en Koninklijk goedgekeurd

Ĉio per amo, nenio per forto. *(S. Franc. de Sales)*

Geestelijk Adviseur LAMB. J. J. M. POELL

Abonnementsprijs f 1.50 per jaar Eksterlanda Jarabono f 2.—	Adres der Redactie: H. HAENEN Tempsstraat 22 HEERLEN	Afzonderlijke nummers 20 cent. Advertentiën 30 cent per regel.

Administratie: J. A. LEIBBRAND, Tilburg.

ANKORAŬFOJE.

Riskante la riproĉon esti konsiderata „ĝenaj", ni denove martelumas sur la saman amboson, kvankam la kaŭzita brusono ne estas agrabla al la oreloj.

Igi ĉesi tium sonaĉon estas nur bagatelo. Se ni nur volas!

Kial tiu bruaĉo?

Kvakam ni ĝin jam kelkfoje sciigis, ni rediros la kialon.

Nia organo „Nederlanda Katoliko" en la nuna amplekso ne kontentigas nin. Pro diversaj motivoj.

Kia ni ĝin deziras?

Je pli ol unu maniero la dezirita amplekso estas ebla.

Nia propra ideo estas la jena:

La organo. konsistanta el minimume ses folioj, aperas du fojojn ĉiumonate. Unu el la du ĉiumonate elirantaj kajeroj estas destinita por: komunikajoj rilate la esperantan movadon, ĝenerale kiel ankaŭ de „N. K."; propagandaj artikoloj; proponoj; raportoj, k.t.p. La dua ĉiumonata organo traktas nur pri la lingvo; lingvaj rubrikoj, unu por novkomencantoj, alia por jam-iom-progresintoj, kaj tria por pli-progresintoj; krom tio tiu kajero enhavas literaturajojn. originalajn kiel ankaŭ traduktitajn.

Ni jam diris, ke ankaŭ aliaj vojoj kondukas al Romo!

Tiamaniere ni opinias eble, ke ni ricevos la necesan intereson por nia organo. Ĉu tio ankaŭ jan ekzistas en la nuna situacio, ni pridubas. Se en tiu rilato ni estas pravaj, kial tiom da mono senutile, aŭ ne sufiĉe utile, elspezita por organo, kiun ni ne sufiĉe ŝatas.

Ni esperas ke ĉi tiu ideo, supre citita, veku atenton, precipe je

nia ĉefestraro. Ni bedaŭras ke ĝis nun ĝi ne konigis sian opinion, ĉu aprobinda. ĉu malaprobinda, pri la de ni aranĝita monkolekto. Kial silenti ĝis la jarkunveno?

Nia proponita pliampleksigo necesigas monelspezojn. Malgraŭ la tre ĝojiga kreskado, dum la lastaj monatoj, de l' membronombro de N.K., nia administranto kaj kasisto ne povas disponigi la por la pliampleksigo bezonatan monsumon. Pagdevo de iu antaŭa ŝuldo premas nian kason.

Forigi tiun premon, jen nia celo!

Tiam ni estos liberaj kaj povos postuli efektivigadon de nia deziro.

Nur unu fojon memvola monofereto po 50 cendoj, po membro, kaj la problemo estas solvita.

Ĉu ni trograndigis, asertante ke ĝi estas nur bagatelo? Jes, aŭ ne?

Ankoraŭ ni estas esperantaj!

Kiom longe? H H.

PROGRAMMA DER JAARVERGADERING

op 25 Mei a.s.

10.30 uur. H. Mis in de kapel van 't St. Andreasgesticht, Springweg,

11.30 uur. Opening der jaarvergadering in het Gebonw voor Kunst en Wettenschappen.

1—2 uur. Pauze.

2 uur. Voortzetting der jaarvergadering.

5 uur pl.m. Sluiting.

Zij, die reeds op Zondagavond 24 Mei in Utrecht aankomen kunnen zich vanaf **6 uur namiddags** begeven naar Hotel l'Europe, Vreeburg, waar leden van de afdeeling Utrecht, tot hun beschikking zullen zijn.

Schriftelijke inlichtingen omtrent logies e.d. te richten aan de Secretaresse der Utrechtsche afdeeling: **Mej. W. A. M. van Dijk, Leidschekade 93*bis* Utrecht.**

Amandementen op de voorstellen voor de a.s. jaarvergadering.

De afdeeling Roosendaal zond het volgende amandement op voorstel 2 (Eindhoven):

Het Hoofdbestuur zorge, in het belang van de leden van N.K. en mede ter voorkoming van moeilijkheden met andere vereenigingen, dat een lijst wordt samengesteld waarop werken voorkomen welke door Katholieken zonder bezwaar gelezen kunnen worden.

Aan de Afdeelingsbesturen.

De volgende afdeelingen deden ons tot op heden (17 April) opgave van hun stemgerechtigde afgevaardigde ter jaarvergadering: Bergen op Zoom, Cuijk, 's-Gravenhage, Groningen, Haarlem, Heerlen, Leiden, Reusel, Tilburg.

Van de andere afdeelingen ontvingen we nog geen bericht, deze gelieven hun opgave alsnog ten spoedigste te zenden aan den bondssecretaris.

Candidaten voor het Hoofdbestuur.

Van den Heer P. A. Schendeler, Eindhoven ontvingen we bericht, dat hij de candidatuur voor het Hoofdbestuur niet kan aanvaarden.

Van meerdere candidaten ontvingen we nog geen bericht of zij zich al dan niet beschikbaar stellen. Hun antwoord wordt ten spoedigste ingewacht door den bondssecretaris

J. H. WESTEN,
Melkweg 10, Groningen.

Tijdens de pauze is er in 't Gebouw voor K. en W. te Utrecht gelegenheid om iets te gebruiken lunch enz.

FINANTIEEL OVERZICHT

1ste Kwartaal 1931.

Ontvangsten		Uitgaven	
Saldo 1 Jan. 1931	fl 22.24	Orgaan	fl 360.57
Contrib. afdeelingen	fl 437.81⁵	Verz. orgaan, porti	fl 28.25
„ div. leden	fl 330.31	Vergadering	fl 12.40
Abonnementen	fl 1.50	Statuten	fl 25.—
Examens	fl 49.99	Propaganda	fl 11.50
Advertentiën	fl 20.—	Diversen	fl 19.87⁵
Steun orgaan	fl 26.—	Fa. Berger	fl 65.05
		Saldo kas	fl 365.21
Totaal	fl 887.85⁵	Totaal	fl 887.85⁵

Voor de afdeelingen, welke vóór 15 April het 2e kwartaal 1931 niet hebben voldaan, zijn de quitanties uitgeschreven en zullen dezer dagen worden aangeboden.

J. A. LEIBRAND,
Penningmeester N. K.

DIVERSAĴOJ.

De Radio-rede van Dr. F. C. Dominicus over „De waarde van Esperanto uit maatschappelijk en opvoedkundig oogpunt".

De door de Heerlensche R. K. Esp. Ver. „Minregiono" uitgegeven brochure dezer radio-rede is na eenige vertraging ter verzending gereed. Een groot aantal present-ex. is bereids verzonden, o.a. aan de Secretarissen der Afd. van N. K. Deze laatsten hebben zich dus kunnen overtuigen, of „Minregiono" de propagandistische waarde dezer rede, waarbij een inleidend woord van den Zeer Eerw. Pater Dr. Gerlachus Royen, O.F.M., te hoog heeft aangeslagen.

Indien bedoelde functionarissen hieromtrent van hetzelfde gevoelen zijn als „Minregiono", en hieromtrent is elke twijfel uitgesloten, dan zullen zij zeer zeker niet in gebreke blijven, deze brochure in hunne afdeelingen te bespreken, en als gevolg daarvan de leden opwekken voor eigen rekening meerdere ex. te bestellen, om ze aan instellingen of personen, die volgens hun oordeel daarvoor in aanmerking komen, ter kennisname toe te zenden.

De wijze van uitvoering is bovendien zoo, dat met reden mag verwacht worden, dat ook niet-esperantisten, evtl. tegenstanders het geschrift niet lichtelijk ongelezen ter zijde zullen leggen.

Zonder eenig voorbehoud dient gezegd, dat met deze brochure doeltreffend en met succes kan gewerkt worden, als wij slechts onzen plicht als propagandist voor onze zaak begrijpen.

De prijs per ex. bedraagt 10 cent + 10 % voor portikosten.

Bestellingen, liefst met bijgevoegd bedrag, te richten aan de secretaresse van „Minregiono": Mej. J. Savelbergh, Heerlen, Geleenstraat 22. „MINREGIONO".

Wij ontvingen een maandelijksch orgaantje, uitgegeven door de R. K. Esp. Ver. „Por Dio kaj Eklezio", den Haag. Uitsluitend door de eigen leden en geheel in Esperanto samengesteld, onder redaktie van S-ro P. M. Brouwer, beantwoordt het zeer zeker aan het gestelde doel: komunikilo en ekzercadilo voor de eigen leden.

S-ro Brouwer brengt daardoor in eigen kring toe te juichen leven in de brouwerij, hetgeen onze beweging weer ten goede komt.

H. H.

S-ro P. Heilker, Hoofddorp, estas nomita kiel ano de la Lingva Komitato. Ni konsideras tion ĉiurilate meritan honoron. Elkorajn gratulojn! H. H.

Candidaten voor het Hoofdbestuur. In het vorig orgaan stond abusievelijk: H. Renders, Voerendaal; dit moet zijn: H. Penders, Voerendaal.

ESPERANTO—EKZAMENOJ EN 1931.

Korektita listo de la datoj.

Por Diplomo A:

Den Haag: Sabaton, la 2-an de Majo;
Groningen: Ĵaŭdon, la 14-an de Majo;
Den Bosch: Sabaton, la 6-an de Junio;
Nijmegen: Sabaton, la 11-an de Julio;
Utrecht: Sabaton, la 24-an de Oktobro.

Por Diplomo B:

Den Haag: Sabaton, la 16-an de Majo;
Zwolle: Merkredon, la 26-an de Aŭgusto;
Arnhem: Sabaton, la 7-an de Novembro.

Por la ekzameno de Hago jam anoncis sin pli ol *200* A-kandidatoj! Fr. W. v. ZON.

Pri la ekzamenoj en ĉi-supre ne cititaj urboj ni kiel eble plej baldaŭ informos. H. H.

REGIONTAGA KOMITATO.

FINANCIEEL RAPPORT 1930/31

Zuidelijke Streekvergaderingen.

Ontvangen contributie:				
Afd. Bergen op Zoom	fl 3.23	Nadeelig Saldo '29/30	fl	2.28
„ Boxtel	fl 1.91	Porto's	fl	0.84
„ Cuijk	fl 3.60	Incasso-kosten	fl	0.98
„ Eindhoven	fl 4.20	Streekvergadering Bergen op Zoom	fl	12.50
„ 's-Hertogenbosch	fl 1.79	Batig saldo	fl	16.10
„ Oudenbosch	fl 2.03			
„ Roosendaal	fl 1.43			
„ Tilburg	fl 10.08			
„ Valkenswaard	fl 1.20			
„ Vlijmen	fl 3.23			
	fl 32.70		fl	32.70

ATTENTIE! De penningmeesters der afdeelingen van „Nederlanda Katoliko", die zijn aangesloten bij het Comité voor de Streekvergaderingen in het Zuiden, worden beleefd verzocht de contributie over het jaar 1931/32 vóór 1 Juni a.s. op te zenden, na deze datum zal per postkwitantie over het verschuldigde, verhoogd met incasso-kosten, worden beschikt. De contribntie bedraagt 12 cents per jaar en per lid der „N. K." afdeeling. Betalingen te richten aan de penningmeester van „Regiontaga Komitato":

A. STAALS.
Dommelen,
Valkenswaard.

ONZE AFDEELINGEN.

Uit Maastricht ontvingen we de ledenlijst van de nieuwe afdeeling aldaar met 31 leden! Hartelijk welkom in onze bond.

Van Br. Philippus ontvingen we een schrijven, dat de afd. Oudenbosch wegens een chronisch gebrek aan belangstelling den geest heeft gegeven.

Het aantal afdeelingen blijft dus stabiel, n.l. 25.

Nog zijn er een groot aantal plaatsen, waar een N. K.-afdeeling

reden van bestaan heeft, maar waar er nog geen is! Wie volgt het goede voorbeeld van onzen Maastrichtschen pionier C. Hagenaars?

J. H. WESTEN.

TUTAN MILON DA N.K.-ANOJ, AL UTRECHT — NI KORE INVITAS.

Nia senripoza kaj ĉiam laborema sekretario konstatis kun komprenebla ĝojo, ke nia ligo nun havas pli ol mil adeptojn. Tro malgranda ankoraŭ, tiu cifero tamen signifas kreskon de preskaŭ kvarcent membroj dum unu jaro. Tiun kreskon ni ŝuldas al la laboremo de multaj geamikoj, el kiuj tamen unu neeviteble mi devas aparte mencii: nia ĉefpropagandisto estas frato Wigbertus van Zon. Honoron al li; al li nia movado ŝuldas multe. Rekompenci lin, ni povas nur, farante niavice tiom de propagando, ke li povos konstati ankoraŭan samgrandan pligrandigon de nia anaro. Se mi bone memoras, por la unua fojo ni festos nian jarkunvenon, havante pli ol mil membrojn. Dudek-kvin sekciojn nombras nia ligo, kaj kredeble dudek-kvin sekcioj sendos siajn riprezentantojn al Utrecht. Sed ne nur delegitoj oficialaj vizitos nian jarkunvenon, sed laŭ malnova, bona kutimo, ankaŭ granda aro da membroj renkontiĝos ĉe nia ĉiujara armeparado. — Ili estos bonvenaj, ni invitas ilin kore. Gravaj estas la proponoj, pri kiuj la kunvenontaro diskutos kaj prenos decidon.

— Sed ankaŭ neoficiale, nia membraro ĉiam dum la jarkunvenoj interrilatiĝas amike, priparolante temojn de propagando kaj organizado.

— Speciale mi volas atentigi pri la renkontiĝavespero, kiun afable organizos la Pentekostan Dimanĉon la Utrechtaj samideanoj.

En Utrecht ni atendas vin,

H. DAMEN.

GAZETARSERVO!

Kelkaj korespondantoj plendis pri la fakto, ke kelkfoje la de ili ricevitaj sciigoj jam pli frue aperis en la nekatolika gazetaro. Por eviti tion, t.e. por gajni tempon kaj samtempe por malpliigi la monelspezojn, la direktoroj de la Gazetarservo en sia lasta kunveno decidis, ke estonte la sekretario Sro de Wolf, Joh. de Breukstr. 34, Haarlem, sendos la sciigojn rekte *ankaŭ* al la katolikaj gazetoj.

Estonte do niaj korespondantoj ne plu ricevos la sciigojn. Mi dankas ilin pro ilia ĝisnuna helpo. — Sed, ĉar mi mem ne povas kontroli ĉiujn katolikajn gazetojn, mi afable petas la korespondantojn, ke ili bonvolu sendi al mi la pri-Esperanto-eltondaĵojn de siaj lokaj gazetoj, por ke ni povu verki raportojn pri la aperintaj sciigoj.

Jenajn gazetojn mi mem povas kontroli: De Maasbode, De Tijd, Het Huisgezin, kaj De Nieuwe Tilb. Courant.

Oni povos rekolekti la eltondaĵojn kaj sendi ilin al mi ekz. ĉiumonate.

Kompreneble oni bonvolu skribi sur ĉiu eltondaĵo la *nomon de la gazeto!*

Mi esperas ke pli da personoj ol ĝis nun, sendos al mi tiajn eltondaĵojn. Kun antaŭa danko kaj samideanaj salutoj.

Frato WIGBERTUS VAN ZON, Reusel.

Het volgende ingezonden stuk „Stem over de wereld" troffen we voor eenigen tijd in „De Maasbode" aan. Het lijkt ons ook in „Nederlanda Katoliko" alleszins op zijn plaats.

H. H.

STEM OVER DE WERELD.

(Ingezonden.)

De Paus heeft gesproken. Zijn stem weerklonk over geheel de wereld en Zijn kinderen hebben met eerbied geluisterd naar die klanken, zoo ver weg en toch zoo dicht bij.

Wij hebben gehoord met eerbied en ontzag en ontroering: de Stem over de wereld.

De wetenschap, hier in de personen van den Franschman Branly en den Italiaan Marconi, beiden Katholiek, heeft zich in dienst gesteld van het Katholicisme.

Daadwerkelijk is weer eens aangetoond, dat wetenschap en Godsdienst niet zulke onverzoenlijke vijanden zijn als onze dwalende boeders nog altijd meenen te moeten beweren.

Wetenschap en Godsdienst hebben hier samengewerkt aan de geweldige mogelijkheid, dat kon klinken, en ieder oogenblik weer kan klinken: de Stem van Christus' plaatsbekleeder, over geheel het aardrijk.

Door onzichtbare krachten gedragen klonk die Stem door tot in onze huiskamers en wie zal beschrijven de indruk, die de Stem teweeg bracht in de harten van millioenen wereldburgers.

Echter..... de Stem over de Wereld is *gehoord,* maar is de Stem ook *verstaan?*

We kunnen het betreuren, maar het *feit* is:

Van de millioenen, die de Stem gehoord hebben, zijn er misschien enkele duizenden die de Stem hebben verstaan.

Als bekende Latinisten, als Prof. Gunning, als vele (zoo niet alle) priesters moeten bekennen, dat ze *niet* hebben kunnen verstaan, dan is daarmee *weer eens* bewezen dat het Latijn nooit de Wereldtaal kan worden. (Dat gaat alleen op, als de reden van het niet-verstaan in de *taal* is gelegen. Red. Maasb.)

Welken indruk zou de Stem gemaakt hebben, niet alleen op de

harten, maar ook op de hoofden, op het verstand van de wereldmassa, als die Stem ook was *verstaan?*

En toch..... zou dit niet onmogelijk zijn? Het is mogelijk! En wel binnen afzienbaren tijd. Immers, er bestaat een taal, die de eigenschap bezit *internationaal verstaanbaar* te zijn en tevens de eigenschap, door iedereen in korten tijd aangeleerd te kunnen worden.

Die taal bestaat niet alleen in theorie *maar in de praktijk*. Reeds tienduizenden, neen honderdduizenden *spreken* en *lezen* en *schrijven* naast hun moedertaal als tweede taal: Esperanto.

En nog *nooit* is het gebeurd, dat Esperantisten, van welk werelddeel dan ook, elkander ontmoetten en elkaar *niet* konden verstaan.

Wie deze feiten niet wil zien, is als de man die niet gelooft aan het bestaan van de Noordpool omdat hij die nooit heeft gezien.

De Stem over de Wereld zou verstaan worden met behulp van Esperanto. En dat ideaal kan verwezenlijkt worden als we werken aan de verbreiding van Esperanto onder de Katholieken. Wij moeten dit idee propageeren en we moeten meer. Wij moeten beginnen bij ons zelf. Wij moeten Esperanto gaan leeren. *Niet* om Esperanto zelf, hoe *mooi* de taal, als taalvak, is; maar om met Esperanto te kunnen werken aan de Katholieke Internationale belangen, om de onoverwinnelijke innerlijke eenheid van onze Katholiciteit ook te maken tot een machtige uiterlijke eenheid.

De Stem over de Wereld heeft niet voor het laatst geklonken. Wij kunnen van den Paus niet verlangen, dat Hij Esperanto zal gaan gebruiken, als niet eerst zijn kinderen getoond hebben Hem te *willen* verstaan.

Want dit is zeker. Als eenmaal de Katholieke Wereld Esperanto gebruikt en daadwerkelijk toepast, dan zal onze H. Vader niet na willen laten de Wereldtaal te gebruiken en dan zal zeer zeker de Stem over de Wereld niet alleen gehoord, maar ook verstaan worden.

Katholieken:

Esperanto is meer dan een amusement, Esperanto is meer dan een taal, Esperanto is een machtig propagandamiddel in dienst van onze heiligste idealen.

Katholieken:

Denkt aan de mogelijkheid: De Stem, die verstaan wordt, over geheel de Wereld. P. M. BROUWER.

ABBé RICHARDSON, HARLEMO.

La Harlema unuiĝo „Abbé Richardson" okazigis sian jarkunvenon la 19an Februaron en la konstruaĵo Sta „Bavo". La Prezidanto G. Hoogeveen malfermis la kunvenon kun kora bonveno al ĉiuj. Laŭ kutimo la tagordo enhavis raportojn de sekretario kaj

kasisto. La jarraporto montris kelkajn interesajn okazintaĵojn i.a. La regiontagon kaj la propagandkunvenon kun la famkonata parolanto Sro P. Heilker. La eksiĝintaj estraranoj estis denove elektitaj. La kutimon paroli nur esperanto dum la kunveno oni forgesis kelkfoje, sed la prezidanto por ĉi tiu fojo estis pardonema. Bedaŭrinda estis baldaŭ tempo por foriri kaj je la deka kaj duono le prezidanto fermis la kunvenon.

L. J. VOGELS, sekr.

(Vertraagde plaatsing. Red.)

OPRICHTINGSVERGADERING DER AFDEELING „LA KATOLIKA SUDO" TE MAASTRICHT OP 16 APRIL 1931.

Nadat onze volijverige propagandist, dhr. C. Hagenaars, met haviksblikken alle R. K. Esperantisten te Maastricht had opgespoord en aangezocht om lid te worden eener nieuw op te richten afdeeling van Nederlanda Katoliko, had den 16den April l.l. de stichtingsvergadering der nieuwe afdeeling plaats. Dhr. J. J. Filott leidde de vergadering.

Aanwezig waren 23 personen, die allen als lid toetraden. Mede was aanwezig dhr. Haenen, die namens „Minregiono" de nieuwe afdeeling kwam begroeten en eenige opwekkende woorden sprak, die met applaus werden begroet. Nadat de afdeeling de naam „La Katolika Sudo" had gekregen, werd 't reglement vastgesteld en een definitief bestuur gekozen. Dit bestuur bestaat uit 5 leden, n.l. de Eerw. Broeder Florianus, de dames L. Verheijen en M. Jansen en de heeren C. Hagenaars en J. J. Filott.

Reeds dadelijk werd besloten een conversatieavond te organiseeren. Als leider werd aangewezen dhr. Filott. A.s. Zaterdag zal de eerste avond gehouden worden en dan vervolgens iedere 14 dagen.

De jongste afd. van Nederlanda Katoliko blijkt een enthousiaste afdeeling te zijn. Moge ze veel er toe bijdragen om Esperanto te verspreiden onder de Katholieken in 't Zuiden des lands.

DE KATHOLIEKE ACTIE VOOR ALGEMEENE ONTWAPENING.

Reeds verschillende couranten maken melding van deze actie die men weldra op groote schaal hier ter lande hoopt te ondernemen en waarbij men de hulp inroept van alle katholieke organisaties en vereenigingen. „De Tijd" spoorde ons reeds aan om in België een proef te nemen en daar de katholieke partij te bewegen diens regeering van de bewapeningsvoorstellen te doen afzien. Waarom, vervolgt 't blad, zouden wij 't niet probeeren. De meerderheid der

katholieken in België verstaan onze taal. Zij kunnen de hooggestemde artikelen in onze bladen lezen. Wij kunnen hen bereiken door de radio via Hilversum en Huizen.

Als een blad als „De Tijd" de eenheid van taal zoo profitabel vindt, hoe moeten wij, katholiek-georganiseerde Esperantisten, ons dan niet sterk voelen door onze wereldbond, waar landgenoot en vreemdeling zich één voelt. 't Ligt niet in de bedoeling uit te wijden over deze actie, doch slechts meer naar voren te brengen een gelegenheid, waar wij door aanknooping van internat. relaties enz. kunnen toonen de groote diensten welke Esperanto het Katholikisme aanbiedt. PACEMULO.

ACTIECOMITE INZAKE DE ONTWAPENINGS-CONFERENTIE 1932.

In dit comité, dat gevormd is, om propaganda te maken, nationaal en internationaal, voor de idee der algemeene en gelijktijdige vermindering der bewapening, en dit wel bijzonder met het oog op de ontwapeningsconferentie die in 1932 te Genève zal gehouden worden, hebben zitting genomen afgevaardigden uit ± 14 der voornaamste katholieke vereenigingen in Nederland. Op uitnoodiging van den secretaris, Pater Mr. D. Beaufort, heeft voor „Nederlanda Katoliko" zitting genomen, de heer H. Damen, die bereids de vergadering op 14 April te Amsterdam heeft bijgewoond.

LINGVA BABILAĴO

de

Max Butin, L. K.

(El „Heroldo de Esperanto.")

Apogante min firme sur tekstoj de niaj Akademianoj Behrendt kaj Nylén, mi ekzamenos antaŭ vi du faktojn. Ne timu, ke mi volas nun instrui gramatikon! Nur veki vian intereson, jen mia modesta intenco.

Sendube nia majstro Doktoro Zamenhof plej bone konis sian lingvon kaj sentis ĝian internan spiriton. Li restos ĉiukaze la plej kompetenta pri Esperantaj lingvaj demandoj. Sed vi konsideru, ke Zamenhof jen kaj jen ne obeas al si mem, al la de li mem starigitaj reguloj, ekz. al la prepozicio „da", por kies uzo li donis klaran regulon kaj kiun li mem ne ĉiam aplikis.

Ni prenu la ekzemplon: „*Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo.*" Ĉu la fakto, ke tiu ĉi ekzemplo troviĝas en la Fundamenta Ekzercaro, ne pravigas la aplikon de „da" en ĝi? Ne, ĉar la Fundamento estas konservata eĉ kun siaj eraroj, laŭ la volo kaj saĝa decido de nia majstro mem.

Nia Fundamento estas kaj restas nia „gvida dokumento", ĝin uzu la progresintoj aŭ eĉ nur la perfektuloj, t. e. la personoj, kiuj

jam multe studis nian lingvon kaj certe mem trovos la erarojn. Por nespertaj novuloj kaj komencantoj la Fundamento kaj Fundamenta Krestomatio ne taŭgas: ili uzu lernolibrojn. — Studu la lingvon! — Dum multjara sperto mi ofte konstatis, ke malordo eĉ en la kapoj de Esperanto-instruistoj ekestis pro tio, ke ili ne sufiĉe studis la lingvon. Ni rajtas postuli de bona, vera esperantisto, ke li flue parolu Esperanton kaj posedu la necesajn konojn por refuti la argumentojn de kontraŭuloj kaj nesciantoj. Malordo facile ekestas pro neklaraj instruoj, kiuj naskiĝas el ne ĝuste komprenita volo de nia genia majstro kies gloron neniam malgrandigos liaj eraroj. Ne forgesu la admonon de Zamenhof: „Al ĉiu, kiu montras al mi ian nebonan esprimon en la fundamenta libro, mi respondos trankvile: Jes, ĝi estas eraro, sed ĝi devas resti tie ĉi netuŝebla, ĉar ĝi apartenas al la fundamenta dokumento, en kiu neniu havas la rajton fari ian ŝanĝon." Nia Akademio tre prave jam korektis la erarajn tradukojn en la Universala Vortaro *ne* ŝanĝante la Fundamenton. — Nia majstro ne nur estis aŭtoro kaj verkisto, li ankaŭ estis homo, kaj ni ĉiuj bone scias, ke homoj eraras dum sia tuta vivo. Ĉu pro la eraroj en gravaj libroj elfalas perloj el la krono de Esperanto? — Certe ne!

Ni estu konsciaj, ke Esperanto fariĝis lingvo vivanta; ĉio vivanta evoluas. Esperanto ankaŭ evoluas; ĝi estas memstara lingvo; ĝi sola estas kompetenta pri si; ĝi sola estas la lasta instanco, kaj Akademio kaj Lingva Komitato humile klinas sin antaŭ la potenca forto, kiun disradias la vivanteco de Esperanto. Ĝi nin gvidas; ni nur konstatas, enregistrigas, konsilas. — Ni scias, ke lingvo estas psikologio kaj ke absoluta logiko en lingvo ne ekzistas. Tamen ĉiu serioza observanto ne povos nei, ke Esperanto estas la laŭeble plej logika moderna lingva konstruaĵo, kiun ni konas. Ĝi instruas nin logike pensi; ĝi akrigas nian logikan senton. Ĝi evitas dusencecon en frazo kiel ekzemple: Ik hoor U prijzen = mi aŭdas vin laŭdanta, *kaj* mi aŭdas vin laŭdata.

Ni venu refoje al tiuj „kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo". Estas eraro, ĉar la apliko de „da" antaŭ la montra pronomo „tiu ĉi" ne estas ebla, same ne kiel antaŭ „la". Temas pri objekto individue difinita, pri objekto konata. Kial estas eraro? Laŭ la U. V. „da" estas uzata post vortoj, kiuj signas mezuron, pezon, nombron kaj kvanton anstataŭ la prepozicio „de", alivorte: anstataŭ la genitivo. Laŭ la Fundamenta Ekzercaro ni vidas la saman regulon, kaj laŭ la Lingva Respondo 16 la vorteto „da", kiu enhavas kaŝite la sencon de „ia", montras, ke ni parolas pri kvanto da ia aĵo, sed ne pri ĝia individueco, alivorte: ni uzas la vorton „da" nur, se ni volas esprimi mezuron aŭ kvanton da ia aĵo signita ĝenerale laŭ speco, sed ne difinita speciale laŭ individueco. El tiu ĉi lasta konstato rezultas, ke „da" *ne* estas uzebla antaŭ la difinita artikolo „la" kaj krome ne antaŭ iu vorto, kiu esprimas individuan specialan difinon pri

iu materio, ŝtofo k.s., alivorte: „da" ankaŭ ne estas uzebla antaŭ la montraj pronomoj (tiu, ĉi tiu), la personaj pronomoj (mi, vi, li ktp.), la posedaj pronomoj (mia, via, lia ktp.) kaj la numeraloj.

Vi eble miras, ke tiu fundamenta regulo tiom ofte ne estas obeata. Dum la tradukado de iu ajn teksto multaj hezitante sin demandas: Ĉu mi diru „de" aŭ „da"? Kaj la kaŭzoj? Ni ne jam sufiĉe „sentas", ĉu vorto aŭ kombinaĵo estas erara aŭ senerara. Se mi diras: taso da kafo, mi scias, ke tiu esprimo estas ĝusta; se mi daŭrigas: taso da la kafo, — aha — jen eraro sentebla; sed, taso da tiu ĉi kafo — esence tute la sama gramatika stato kiel ĉe „la" — oni ne plu tiel facile perceptas kiel eraron. — Strange, ĉu ne, ke eĉ nia majstro faletis en truon mem fositan.

Nu, en nia gepatra lingvo, ni sentas, perceptas, vidas kaj aŭdas preskaŭ ĉiun efektivan eraron. En Esperanto mankas al ni multjara tradicio kaj Esperantlingva fundamento-sento. Ĝis nun nur unu generacio parolas la helplingvon, ne kiel ĉiutagan, sed nur kiel *okazan*. Due la infanoj (kun kelkaj esceptoj) ne lernas kvazaŭ ludante Esperanton, la lingvon de siaj gepatroj; kaj trie la verkistoj aŭ artikolskribantoj ne ĉiuj posedas la lingvon en tia grado, kian oni rajtas postuli. Pro tio svarmas la eraraj esprimoj kaj frazeroj tra gazetaro kaj literaturo, de multaj ne rimarkataj kiel tiaj, sed bonafide akceptataj. Ĝuste la prepozicio „da" estas tia trompema vorteto.

Zamenhof, la *aŭtoro* de Esperanto, genie perceptis la rolon de l' vorteto „da"; ne estas grave, ke la *verkisto* Zamenhof jen kaj jen iom libereme interpretis tiun rolon. Sed grave estas, ke la uzado de l' prepozicio „da" kunformiĝu kun la cetera reguleco de nia lingvo. Ni ja ne rajtas tuŝi la Fundamenton, kaj pro tio ankaŭ ne rajtas senĝene ĵongladi per „de" kaj „da". Ne forgesu la ekzemplojn: Bukedo *da* rozoj, kaj bukedo *de* rozoj. En la unua kazo temas pri la *kvanto*, kaj en la dua pri la *individueco* (florspeco).

Mi nur supraĵe tuŝis la demandon pri la ĝusta apliko de *„da"*; ĝi efektive tiom profunde penetras en la strukturon de la lingvaj leĝoj kaj de la eblecoj atingi ĝisfinan logikan koncepton, ke ni finfine atingos tian gradon de subtileco, ke la diferencigoj interesos jam nur profesiajn aŭ amatorajn lingvistojn. Kaj tia prosedo montros aliflanke la verecon de jam spertita fakto. Oni trovos Esperanton malfacila lingvo, se oni nepre volas aŭ klopodas elĉerpi la apenaŭ elĉerpeblan puton de la lingvaj sekretoj. Tiun malesperigan ĝuon ni lasu al la teoriistoj kaj cerbumemuloj. Por ni, praktikuloj, sufiĉas la ora mezovojo, tiu de l' vivo praktika. Laboru por ni la teorio; ni marŝos sur la firma tero de l' praktiko. El ambaŭ kunfandiĝos la kristalklara vivondona akvo de l' saĝeco.

(Estas daŭrigota)
(Fr. W. VAN ZON)